



3(139)
2013

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Eligiusz Dymowski

Początek lata

czerwcową noc
pachnącą jaśminem
układa pasjanse
na szczęście

tylko gwiazdy wiedzą najlepiej
jak krwawi serce
zranione ostem
o świcie

Koncert świerszcza

Moich uczuć na codzienność nie wystarczy –
zbyt porwane, poplątane
wciąż na tarczy.

Sny za późno się spełniają
albo wcale.

Wciąż te same dni i noce
odmierzane.

Jakby jeszcze było mało: ktoś odchodzi.
Gubi słowa, aby wyznać najważniejsze.

To co proste miało być –
pozakrzywiane.

To co śmieszne, już nie śmieszy,
bo wyśmiane.

Jeszcze jakiś zapach kwiatów,
zasuszonych wraz z miłością co umarła.

Niech ten koncert się zakończy,
bo nie można żyć tęsknotą tak – do diabła!

Komenco de la somero

junia nokto
aromanta jasmene
dismetas pacienc-ludon
por feliĉo

nur steloj scias la plej bone
kiel sangas la koro
vundita per kardo
aŭrore

Koncerto de grilo

Por ĉiutago ne sufiĉas miajn sentojn –
ili tro ŝiritaj, implikitaj
ĉiam sur ŝildo.

Tro malfrue aŭ neniam
plenumiĝas sonĝaj bildoj.

Ĉiam la samaj tagoj, noktoj
laŭ mezuro.

Se ankoraŭ ne sufiĉus: iu foras
por konfesi gravan perdas vortojn plurajn.

Kio ŝajnis iam simpla –
estas kurbigita.

Ridinda ne ridigas,
ĉar ĝi ridmokita.

Krome floroj odorantaj neagrable,
sekgitaj kun la amo, kiu mortis.

Jam finiĝu ĉi koncerto,
ĉar ne eblas vivi per l' sopiro – diable!

Sankta Patriko – la nacia heroo de Irlando

Kiel ĉiuj aperaĵoj de la kulturo, socia vivo kaj familiaj kutimoj – la nomoj donataj al infanoj ankaŭ dependas de modo. Al preskaŭ nekonataj pli frue fremdaj nomoj kaj nun tre popularaj en Pollando apartenas nomo Patriko. Valoras ekkoni la vivon kaj agadon de ĉi tiu elstara persono.

La nomo Patriko devenas de la latina formo *Patricius*, t.e. ano de familio, kies patro estis senatano. En iama Pollando ĝi tre rare funkciis en formoj *Patrycy* aŭ *Petrycy*.

La skribaj fontoj konas 11 sanktulojn portantajn ĉi nomon; la plej grava tamen estas apostolo kaj nacia heroo de Irlando. Li naskiĝis ĉirkaŭ 385 j. en Skotlando, en setlejo Tabernio (Tubernio), kiun oni ne povas hodiaŭ identigi. Liaj gepatroj estis romanoj, kiuj devis loĝi en apartenanta al imperio parto de Britio, ĉar la patro estis ŝtata funkciulo (dekurion = dekestro). Patriko estis baptita, sed oni edukis lin tute laike. Kiam li estis 16-jaraĝa kaptis lin piratoj kaj vendis kiel sklavon al Irlando. Oni razis lian kapon kaj sendis al plej alta sacerdoto de druidoj, Milchy. Ĉe li, dum 6 jaroj, juna sklavo paŝtis brutaron. Pagana Irlando regata de princoj kaj batalantoj, obeanta religion de druidoj estis lando interesa, eĉ fascina. Patriko eklernis ĝian lingvon kaj ekkonis kutimojn, kio poste helpis lin dum la pastra laboro. Malfeliĉoj igis la junulon al Dio, li komencis pensi pri religiaj aferoj kaj preĝi. Post la sonĝo, en kiu voĉo de Dio ordonis al li fuĝi de sia mastro, junulo marŝis ĉirkaŭ 200 mejloj, por atingi marbordon, kie li trovis ŝipon al Britio. Dum la revena vojaĝo Patriko travivis multe da malagrablajoj – mokadon de kamaradoj, kiuj ridis pro lia kredo kaj preĝoj al Dio, mankon de nutraĵo kaj sekuro. Li diris al mokantoj: „Krede kaj elkore vi turnu vin al la Sinjoro, mia Dio, por kiu nenio estas neebla.” Kaj subite ili troviĝis inter porkaro, kaj post mortigo de kelkaj bestoj, havis sufiĉe por manĝi dum resto de vojo. Malgraŭ la fuĝo Patriko ne povis forgesi Irlandon. Ĝi revenadis al li en sonĝoj; estis ankaŭ tia, en kiu la irlanda popolo vokis al li: „Ni petegas vin, la sankta junulo, por vi venu kaj ankoraŭfoje trairu inter ni.” Tiam Patriko ekkomprenis, ke lia destino estas labori super konverto de irlandanoj. Por ĝuste prepariĝi al tiu tasko li komencis studi ĉe sankta Germano de Auxerre, sur kontinento. La eklezia rego ordonis al li esti anstataŭanto de la unua episkopo de irlandanoj – Paladio. Veninte al Irlando (432 j.?) li gvidis la misian agadon en norda kaj okcidenta partoj de la lando. Rapide li sukcesis konverti multajn estrojn de gentoj, kune kun la familioj. Apogis lin ĉefo de lokaj regantoj Laoghaise. Patriko jam kiel sacerdoto kaj episkopo organizis novfonditan, irlandan eklezion laŭ lokaj kondiĉoj. Lia vivo ne estis facila, malagrablajojn faris al li eĉ la proksimaj kunlaborantoj. Senĉese atakis lin druidoj, kiuj ne emis rezigni de siaj influoj. Pli riĉaj konvertitoj, arda adeptoj de la nova kredo oferis al Patriko grudon kaj domojn, kiujn li destinis por bezonoj de la formanta sin irlanda eklezio.

Multaj mirakloj faritaj de sankta Patriko helpis al lia agado. Inter ili la plej ofte oni mencias pri resanigoj de malsanuloj kaj malkovro de torentoj sur la senakva dezerto. Fama fariĝis afero de la mirakla fajro. Loghaire, la plej Alta Monarko de Irlando alvokis ĉiujn gentajn estrojn celebri specialan feston en Tara. La reĝa dekreto decidis, ke fajroj de la tuta lando devas esti estingitaj, ĝis kiam ne ekflamos la fajro en rezidejo de la reĝo. 26-an de marto, en la j. 433, dum la Paska Dimanĉo, sankta Patriko venis al monteto Slano (vid-al-vide Tara) kaj ekbruligis la paskan fajron. Druidoj tuj informis pri tio la reĝon. Malgraŭ multaj penoj estingi la fajron kaj mortigi tiun, kiu kuraĝis ne obei la reĝan ordonon – la streboj fiaskis. Oni ne scipovis likvidi la patrikan fajron. Triumfo de kristana religio en ĉirkaŭaĵo de Tara estis kompleta. Profetaĵo de druidaj sacerdotoj, ke „tiu paska flamo restos en Irlando por eterne” realiĝis. Multaj irlandanoj akceptis kristanan religion kaj komenciĝis jam senobstakla instruado de Evangelio en la tuta lando. 5-an de aprilo, de la j. 433 – dato de publika bapto de la reĝa frato kaj aliaj elstaruloj, fariĝis laŭ malnovaj fontoj dato de bapto de Irlando. En la jaro 444 Daire, estro de distrikto Armagh permesis konstrui tie la unuan preĝejon. Malgraŭ forta rezisto de druidoj, kiuj konspiris kontraŭ Patriko kaj misiistoj, ilia laboro bele disvolviĝis kaj floris. Ankoraŭ dum vivo de la sanktulo tuta Irlando estis kristana. Li konsekris ĉirkaŭ 350 episkopojn surloke kaj interrilatis kun la tuta kristana mondo. Inter alie vizitis lin sankta Brigita de Svedio kaj enmanigis al li mem-faritan mortotukon.

La dato de lia morto estas necerta. Multaj esploristoj proponis diversajn jarojn – inter 457

kaj 498 j.; ĉiuj tamen fiksas la saman daton tagan: 17-an de marto, do tian tagon enhavas ankaŭ la nova liturgia kalendaro (1969 j.) kiel tago de morto de s-ta Patriko kaj tago de lia nomo. En urbo Sabhhal, supozebla loko de lia morto estis konstruita granda katedralo.

S-ta Patriko jam en frua mezepoko estis omaĝata ne nur sur la Verda Insulo. Lia biografio konsistas ankaŭ el multaj legendoj. La plej populara estas transdono pri profundaĵo en la tero, en Lough Derg. Sankta Patriko descendis tien por konsideri la infernajn punojn. Ĝis nun al tiu loko alvenas multaj pilgrimoj.

Irlandaj simboloj kunligas sin kun tiuj akompanantaj al agado de la sanktulo. Kruco estas signo de la misiaj taskoj. Bapto montras ligojn kun bapto de la tuta lando. Demonoj ĉiam strebis malhelpi la nacian heroon en la nobla vivo kaj laboro, feliĉe li scipovis efike rezisti preĝante al Dio kaj fidante je Lia protekto. Harpo estas simbolo de ekstermondo, de dia laŭdo, de la ĉiela rego, de sanktulaj preĝoj, de ŝtupetaro al la ĉielo. En tradicio juda-kristana ĝi estis instrumento de profetoj, atributo de reĝo Davido. En kulturo kelta ĝi havis specialan signifon. Keltoj harpludis la tradician muzikon en tri formoj: rideto, ploro kaj dormo. Harpo fariĝis emblemo de Irlando, parte de Kimrio. Serpento simbolas i.a. primarajn fortojn de kosmo, kaoson, satanon. Estis multegaj ekzemploj de la serpenta funkciado en kulturoj de diversaj nacioj. La plej grava ligo inter s-ta Patriko kaj serpento estas venko de la sanktulo super kulto de faluso – tre populara en pagana Irlando. En ĉi kulto gravis simileco inter ĉi rampulo kaj faluso. La saman aferon simbolis rondaj, altaj turoj, kiuj ankaŭ rolis en la falusa kulto. Trifolio pro la rapida kresko estis simbolo de la viva forto. Ĉe keltoj ĝi estis kreskaĵo magia kaj saniga. S-ta Patriko uzis trifolion por klarigi al popolo la misteron de la Sankta Triunuo montrante ĝian tri folietojn sur unu trunketo. Mezepoko akceptis ĉi tiun bildigon kaj trifolio fariĝis simbolo de la Sankta Triunuo. Ĝi estas ankaŭ emblemo de s-ta Patriko kaj de Irlando.

Alicja Sacha kaj Lidia Ligęza

Certaj problemoj apliki akuzativon.

Cititaj sube ekzemploj povas helpi al tiuj, kiuj faras akuzativo-erarojn. Da frazoj estas multe, do ni havas bonŝancon perfektigi la lingvokonon.

- ★ Rilato kun tiu sperta homo donos al vi **fortojn** batali kontraŭ malfacilaĵoj.
- ★ Aĉetu **panon, sukeron, freŝan lakton**.
- ★ Mian pezantan **duonkilogramon** poŝtelefonon mi dezirus ŝanĝi je malpli peza.
- ★ Serĉu **eraron** en tiu frazo.
- ★ Ne serĉu **saĝan penson** en tiu gazeto.
- ★ **Kian teon** vi deziras? **Fortan**.
- ★ **Malgrandan rolon** ludas tiuj du urboj troviĝantaj malproksime de la ĉefaj vojoj.
- ★ Mi ne forgesos **vin**.
- ★ Du **kilometrojn** for de la ŝoseo troviĝas mia domo.
- ★ Pripensu **tion!**
- ★ Mi opiniis **vin** fidela amiko, sed mi eraris.
- ★ **Kion** vi proponas? **Kian ekskurson?**
- ★ **Vin** mi pardonas, sed pardonu **lin** ne eblas: li ege kulpis.
- ★ La vorto "manki" ne toleras **akuzativon**. Mankas al mi mono kaj tempo.
- ★ Petro skribis **tiun leteron** sabate, sed povos sendi **ĝin** ĵus lunde.
- ★ La knabo volas **kukon**.
- ★ La korto estas 15 **metrojn** larĝa.
- ★ Ni iru en la **direkton** de tiu lumo.
- ★ Ne forgesu **niajn belajn vesperojn**.
- ★ Iru **rekten**, poste turnu **dekstren**.
- ★ Mi ŝatus vidi **vin** afabla, sed tia vi ne estas.
- ★ Tiu vagono pezas 5 **tunojn**.

- ★ Mi iros **tien** lunde, la 13-an de majo.
- ★ La vendejo troviĝas **kelkajn metrojn** de ĉi tie.
- ★ Infanoj ŝatas manĝi **bombonojn**.
- ★ Ni travivis **belan eventon: elekton** de polo kiel papo.
- ★ **Min** doloras gorĝo.
- ★ **Andreon** doloras kapo.
- ★ Jam 10 **jarojn** ili lernas la **lingvon Esperanton**, sed daŭre faras **erarojn** pri akuzativo.
- ★ **Kion** vi volas diri al mi? **Tion** jam mi scias, sed vi prisilentis **ion alian**.
- ★ Li travivis **grandan ĝojon**.
- ★ Ni iru la **vojon celitan**.
- ★ Ili priridis **lin** pro lia nekutima aspekto.
- ★ Kiam vi jam konos la **rezulton**, sciigu min pri ĝi.
- ★ Ĉiuj esperis **ŝian alvenon**.
- ★ Nekutima ideo venis al **lian kapon**.
- ★ Vi rajtas ŝanĝi la **vortordon**.
- ★ Tiu medikamento ŝanĝos **vian triston** en **ĝojon!**

Laŭ artikolo de Mara Majerczak „Cent akuzativo-eraroj”

Stanislav Komárek

Per ekonomia kresko al velura sklaveco

En la fono de la nuntempa krizo estas konstatebla ĝenerale disvastiĝinta kredo pri neceso de ekonomia kresko. Temas pri kredo, kiun senprobleme partoprenas ĉiuj tavoloj de loĝantaro: homoj malriĉaj kaj riĉaj, stultaj kaj saĝaj, kleraj kaj malkleraj. Riĉuloj atendas, ke ilia riĉo kreskos ankoraŭ pli, malriĉuloj kredas, ke ankaŭ por ili restos iom, kleruloj, ke ili ricevos subvenciojn por siaj projektoj, malkleraj homoj, ke ili ricevos senlaborulan subtenon kaj ne estos devigataj ion lerni. Ĉiuj iumaniere fiksis sian vidon al ekonomia kresko, nur absolutaj ekstravaganculoj opinias, ke ne estas necese, ke la ekonomio kresku eterne, ĉar, kiel konate, arboj ĝis la ĉielo kreskis neniam. Kiam la kresko-religio subite ĉesas funkcii, ekestas ĝenerala maltrankviliĝo, kiun oni nomas krizo...

Se mi allasus, ke io min preme timigas, estus tio malaperado de vivosenco. Leviĝas demando, kial ni ĉion ĉi faras? Kial ni deziru novan bankan krediton, novan domon... Biblio ja diras: se homo eĉ la tutan mondon gajnus, sed sur sia animo damaĝon suferus, li estus iranta sur misa vojo. Estas bezone, ke ni konsciiĝu, kio por ni estas grava. La vivo de homo estas principe mallonga kaj nian klopodon kaj zorgadon ni turnu al aferoj, kiuj tion meritas. Da tiaj ne estas multe...

Zorgi pri sia vivofeliĉo kaj ĝoji pro la plej ordinaraĵoj. Ekzemple en suna tago okazigi promenon. Ĉe la nuntempa socio malĝojigas la fakto, ke ĝi en ĉiutaga tumultado jam ne scias tion fari. La nuntempa konsumado estas imagebla kiel velura sklaveco.

kompilis kaj tradukis al E-o *Jan Werner* el Ĉeĥio

Krakova Societo ESPERANTO

La programo de la renkontoj maje 2013 j.

- 9. 05. – Marta Michałowska. **Ĉastaj/Puraj Landoj en budhismo**
- 16. 05. – Grażyna Porada. **La esperantaj lingvaj ludoj**
- 23. 05. – Andrzej Feuer. **Rimarkoj pri juneco laŭ libro de Kim Woo-Choong „Vastas la mondo, mutas laboro”**